



MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 6

JUNIO 2025 Kol. 479/41

XX

Enhavo : Junio, Elektitaj komitatanoj, Hundoherooj, Sukceso
en televido, Esperanto en Universitato, Brno – Burno?

XX

Junio

Vin bonvenigis en la mondo verda ombro de la arboj,
ĝardeno en printempo silentigis vian ploron.

Ni en junio ĉiu rememoras, kion dediĉis al ni la unua,
ni banas nin kun vi en ĝia suno.

La revo de gepatroj viaj kun la revo de l'popolo floras,
vin ankaŭ ligis ĝi en sorĉan ĉenon,
kie malsato kaj mizero eksilentas,
kie malaperadas ĉio, kio homon ĝenas kaj lin doloras.

Vi revu, ludu en junio via. Vi infanoj ĉiuj revu
la plej superban revon de la hejmo,
ĝis diros granda tago: Plenumiĝo estas mi, vin levu!

Karel Toman – Monatoj,
en E-on tradukis J. Mráz,
Bildo de Z. Pospíšilová.



ELEKTITAJ 5 KOMITATANOJ B DE UEA: MANDATO 2025-2028

Komitatanoj B reprezentas la IM-ojn en la Komitato, la supera organo de la Asocio.

La novaj komitatanoj B estas José Antonio del Barrio el Hispanio, Marija Belošević el Kroatio, François Lo Jacomo el Francio, Wu Guojiang el Ĉinio kaj Espoir Kasati el D.R. Kongo. La nove elektitaj komitatanoj B ekoficos dum la malfermo de la ordinara kunveno de la Komitato dum la 110-a Universala Kongreso en Brno, Ĉeĥio.

UEA gratulas al la elektitoj kaj deziras al ili aktivan kontribuadon al la Komitato kaj la Asocio.

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

Hundoherooj

Sinjoro František Omelka (1904 – 1960), morava instruisto kaj entuziasma esperantisto, eldonis en la j. 1946 libreton La Alaska Stafeto, kiu estis krom Esperanto tradukita en germanan kaj anglan lingvojn.

La libro rakontas historion de la jaro 1925 en la alaska urbo Nome, kie eksplodis difteria epidemio. Stafeto de dudek muŝeroj - homoj kaj iliaj 150 hundoj vojaĝis de la 27-a de januaro ĝis la 2-a de februaro 1925, 127,5 horojn, 1085 kilometrojn, por transporti al Nome kontraŭdifterian serumon. Ili savis eble centojn eble milojn da homaj vivoj.

La vojaĝo estis ege danĝera: malaltaj temperaturoj, forta vento, moviĝanta glacio en la Beringa maro. Tiu ĉi vojo estis antaŭe uzata de sledhundoj por livero de poŝto, provizoj, feloj kaj oro kaj la tempo de vojaĝo daŭris ĝis 30 tagojn. Ĉi-foje hundoj

devis vojaĝi malpli ol ses tagoj, por ke la serumo ne difektiĝu. La hundaj herooj, la gvidhundoj Togo kaj Balto, fariĝis famaj steloj.



Memore al tiu ĉi evento okazas ĉiujare hunda sledovetkuro „Iditarod“ inter urboj Anchorage kaj Nome. Unue tio okazis en la j. 1967 kiel parto de la centjaraj festadoj. Usono aĉetis Alaskon de Rusio cent jarojn pli frue.

Ankaŭ en Ĉeĥio okazas ĉiujare simila hunda sledovetkuro „Czech Long

Trail – Šediváčkův long“ en la montaro Orlické hory. Ĝi nomiĝas laŭ la hundo pafita de ĉasisto antaŭ la komenco de la unua jaro. La vetkurantoj finkuras 200 aŭ 300 km longan vojon, ili tranoktadas ekstere kaj venkas altodiferencon de pli ol 7500 m. La unua vetkuro okazis en la j. 1997. Ĉi jare partoprenis 80 vetkurantoj el 8 landoj. Oni vetkuras en pluraj kategorioj, de skikurantoj kun ununura hundo ĝis dekdukaj hundaj teamoj.

El gazeto tradukis St. Nováková

Sukceso en televida konkurso

La inteligentaj kaj kuraĝaj homoj povas partopreni televidan kvizon. Ekzistas pluraj kvizoj en la ĉeĥa televido, ekzemple, *Kie estas mia hejmo?*, *Ĉasanto*, *AZ-kvizo*. Meze de aprilo ĉi-jare ni povis vidi nian amikinson, esperantistinson Milada Zemanová el



Pacov, kiu
estas
delonga
membro de
AEH. Ŝi
jam
partoprenis
plurajn
televizajn
kvizojn kaj
sukcesis.
Ankaŭ ĉi-
foje ŝi
bone

respondadis en la AZ-kvizo kaj sukcesis partopreni en 4 partoj de la konkurso. Ni sincere gratulas ŝin.

Kiam la konkurso-moderisto demandas la konkursantojn pri iliaj ŝatokupoj, Milada ĉiam mencias Esperanton, interalie. Estas bone, kiam la spektanto aŭdas mencion de ĉi tiu lingvo. Ni deziras al Milada daŭran sukceson kaj vivĝojon!
Leonarda Ch.

En la universitato pri Esperanto

Danke al iniciato de membroj de la Esperanto-klubo en Pardubice mi estis petita prezenti Esperanton dum 90-minuta prelego al la studentoj de la Universitato de la tria aĝo. Ĝi okazis la 25an de aprilo 2025 en la Trafika fakultato Jan Perner de la Universitato en Pardubice.

Komence mi prezentis al atentemaj studentoj (plejparte studentinoj) koncizan historion de internaciaj lingvoj kaj de Esperanto, poste la lingvon (klarigo de la fundamentaj ecoj: kial ĝi estas malgraŭ sia riĉeco multe pli facile lernebla ol naciaj lingvoj, do ĝia reguleco, manko de esceptoj, unusencaj sufiksoj kaj prefiksoj, logiko, multaj tiel nomataj internaciaj vortoj), post kiam mi koncize klarigis la tutan gramatikon de Esperanto kaj montris plurajn ekzemplojn en tradukoj.

En la sekva parto mi iom montris la historion de Esperanto-movado en Ĉeĥio kaj ankaŭ konkrete en Pardubice, kaj en la fina parto mi prezentis kaj komentariis fotojn el miaj vojaĝoj tra la mondo, dank' al Esperanto.



Ne nur, ke oni tre atente aŭskultis, sed fine de la disponebla tempo eksonis pluraj demandoj, kiujn mi laŭeble respondis. Klare, mi ne povis respondi la plej oftajn demandojn de neesperantistoj, nome kiom da esperantistoj estas en la mondo kaj ĉu ankaŭ nun junuloj lernas Esperanton. Al la unua mi reagis, ke se oni diros al mi, kiom da neitaloj parolas la italan, mi kun la sama precizeco diros, kiom da homoj parolas Esperante. Unue, ne ĉiuj ŝatas organiziĝi, do ne povas esti

statistiko, due, estas granda diferenco, kion oni konsideras *koni la lingvon*. Ĉu nur iel primitive interkompreniĝi, ĉu flue konversacii pri ĝeneralaj temoj kaj legi simplajn tekstojn, ĉu legi romanojn kaj fakan literaturon kaj aŭskulti radion, aŭ ĉu pensi en Esperanto, verki en ĝi kaj uzadi ĝin samnivele kiel sian gepatran lingvon. Laŭ tio estas pritakso, ke estas inter unu kaj ok mlionoj da esperantistoj. Sed estas mezo de diversaj pritaksoj, kiun ne eblas pruvi.

Al la dua, rilate al la junuloj kaj Esperanto, mi reagis, ke respondi tion estas eĉ pli malebla, ĉar junuloj eĉ malpli ŝatas organizadon en kluboj kaj asocioj kaj krome, plejparto de junaj esperantistoj, kiujn mi konas, lernis ĝin pere de la retaj kursoj hejme kaj uzas ĝin nur per interreto. Tamen ekzistas vigla junulara Esperanto-movado en multaj landoj, ekzemple en Germanio, Suda Koreio, Togo ..., bedaŭrinde ne en Ĉeĥio.

Petro Chrdle, chrdle@kava-pech.cz

Brno laŭdata en facila lingvaĵo

Aperis nova kaj interesa artikolo en la retejo <uea.facila>, kiun prizorgas Anna Lowenstein. La artikolon verkis Ruth Keveess-Cohen kun titolo ‘Kial Burno?’:

Kial Burno?

Eblas aŭskulti ĉi tiun artikolon, kiun voĉlegis Rafa Nogueras.

La UK (Universala Kongreso) okazos ĉi-jare en la urbo Brno, Ĉeĥio. *Brno* estas la nomo de tiu urbo en la ĉeĥa lingvo, sed ĝis

lastatempe ĝi ne havis ĝenerale akceptitan Esperantan nomon. Ĉu la ĉeĥa nomo povus funkcii en Esperanto sen ŝanĝi la literumon? Tio estis la demando, kiun renkontis la organizantoj de la UK pasintjare. Membroj de la LKK (Loka Kongresa Komitato) en Ĉeĥio kontaktis UEA, kiu diskutis tiun demandon kun la Akademio de Esperanto. Ni esploru la demandon, kiel niaj kleruloj respondis al ĝi.

Kial *Brno* prezentas problemojn? Estas pluraj kialoj. Unue, en Esperanto ĉiu silabo devas enhavi vokalon, sed en la unua silabo de *Brno* mankas vokalo. Tial *Brno* neniel povas esti plene Esperantigita nomo. (En la ĉeĥa lingvo la litero *r* povas funkcii kiel vokalo, do *Brno* tamen estas facile elparolebla por ĉeĥoj.)

Due, kvankam estas akcepteble uzi fremdlingvajn loknomojn en Esperanto kiam Esperanta formo ne ekzistas, necesas zorge atenti la uzon. La urbo *Brno* estas akceptebla en Esperanto kiel fremdlingva formo, sed kiel oni nomu la loĝantojn? La formo *Brno-anoj* estas akceptebla, ĉar oni rekonas, ke *Brno* estas fremdlingva nomo. Sed oni ne rajtas diri **brnanoj*, aldonante Esperantan finaĵon al fremdlingva radiko. Kaj kiel oni formu la adjektivon en Esperanto? **Brna* ne estas akceptebla vorto en Esperanto. Do estas plej konvene, ke ekzistu Esperanta nomo.

Trie, la UK-urbo tradicie havas Esperantan nomon; kiam mankas tia nomo, UEA decidas pri ĝi. Ekzemple en 2015 la UK okazis en *Lillo* (Lille, Francio) kaj en 2019 en *Lahtio* (Lahti, Finnlando).

Kiun Esperantan nomon elekti por Brno? Ĝia nomo en diversaj naciaj lingvoj estas sama kiel la originala *Brno*, sed ekzistas aliaj formoj en pluraj lingvoj. Tial ne estis evidente al la kleruloj

en UEA kaj en la Akademio, kion fari. Ekzemple, en la germana ĝi estas *Brünn*, en la latina *Bruna*, en la jida *Brin*, en la albana *Bërno*. La akademianoj konsideris formojn kun aliaj vokaloj, ekz. *Barno*, *Berno*, *Birno*, *Borno* kaj *Burno*. *Berno* jam estas Esperanta nomo de la svisa urbo Bern, do ne taŭgas por Brno. Oni konsideris *Bruno*, sed ĝi estas ofta vira nomo, kaj bruno estas koloro. *Burno* ne havas tiajn malavantaĝojn, kaj ĝia elparolo sufiĉe similas al la nacilingva elparolo de *Brno*. Tial finfine la rekomendo de la Akademio estis *Burno*.

La ĉefa problemo pri la nova Esperanta nomo de Brno estas, ke *Burno* ne estas tuj rekonebla. Tial en kongresaj informiloj foje aperas la du nomoj kune: “Burno (Brno)”. Kompreneble kiam oni aĉetas bus-, trajn- aŭ flug-bileton al la kongresurbo ĉi-jare, oni uzu la nacilingvan formon *Brno*! Bonan vojaĝon al Burno (Brno)!

Ruth Keves-Cohen El la EKO 19 Hungario

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,

530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: ah@esperanto-ah.eu interreto: www.esperanto-ah.eu

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**

IBAN: CZ3520100000002801322017 **SWIFT/BIC:** FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.